# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA
SCS - Edifício Goiás - s/603
Tel.: 225-4761

Caixa Postal 04-0406
70000 - Brasília-DF - BRAZILO

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Praça da Republica,
54 - 2.
20211 RIO DE JANEIRO (RJ)

05 MAR 1981
BRASÍLIA - DF
25 FEV 1981
2,00 BRASIL CERAMISTA

- F E B R U A R O 1 9 8 1

## - J A R A A S E M B L E O D E N I A A S O C I O -

Ne kredeble, sed unu plia jaro forpasis de la lasta ĝenerala kunveno de nia Asocio, kiu, la unuan de marto 1980, difinis la gvidlinion de nia agado antaŭvide al la Univesala Kongreso.

Estis jaro de intensa aktiveco por la (mal)multaj, kiuj respondecas pri nia societo. Por la aliaj verŝajne, temis pri normala jaro kaj eble ili havis la impreson, ke ONI tro malmulte faras por disvastigi Esperanton en nia urbo. La kulpo ja falas ĉiam sur tiu anonima ONI kaj ne koncernas nin unuope!

Sekve, ni invitas ĉiujn membrojn partopreni la jaran asembleon, Sabaton la 14an de marto laŭ la jena :

## C O N V O C A Ç Ã O

A Assembleia Geral Ordinária da nossa Associação é convocada para Sabado 14 de março de 1981, às 20 horas na sede do Conselho Brasileiro de Esperanto ( SCS Ed. Jockey Club - Sala 103), para discutir a seguinte

### ORDEM DO DIA

- Relatório das atividades 1980
- Cota de adesão 1981
- Informe sobre o 66º Congresso Mundial de Esperanto
- Várias

Enivaldo Alves Silva
Presidente


## - LA DELEGITOJ DE UEA INVITATAJ KUNLABORI -

LKK Brasília starigis, ek de Februaro, "Gazetaran Servon" por informadi la grandajn amas-komunikilojn pri la Universala Kongreso. Laŭ semajna ofteco oni komencis dissendadi komunikojn al pli ol cent tag-ĵurnaloj, revuoj, radio-kaj-TV stacioj, precipe en la ĉefurboj de ĉiuj brazilaj ŝtatoj.

Samtempe, apartaj kontaktoj estis starigitaj kun novaĵ-agentejoj en la ĉefurbo. Tiu vasta agado, kiu daŭros ĝis la kongreso kaj kompletiĝos per konstanta "Gazetara Servo" dum la kongreso mem, celas plibonigi la nivelon de la infomado pri Esperanto kaj pri la kongreso tra la tuta lando.

La rezulto estos des pli efika, se la delegitaro de UEA, en la unuopaj urboj, klopodos siavice starigi personajn kontaktojn kun tiuj medioj por subteni nian iniciaton. Tiucele, ni alvokas al kunlaboro ĉiujn D kaj FD de UEA. Al tiuj, kiuj pozitive reagos, LKK dissendos la samajn komunikojn utiligitajn por la ĝenerala informado. La konata adreso de LKK estas :

" Caixa Postal 04-0406
70000 - Brasília -(DF) "



## ESENCA KONTRIBUO DE RADIO-AMATOROJ

Estus preskaŭ ne penseble organizi Universalan-Kongreson de Esperanto en Brazilo, se ne ekzistus radioamatorismo! Rapidaj kontaktoj tra la etero jam solvis amason da problemoj inter LKK kaj UEA. Laŭ la triangula itinero Schoten (Belgio), Brasília, Bona Espero, iras la voĉoj de ON8XZ, PT2CA kaj PP2LE helpe al la glata disvolviĝo de nia tasko. Lastatempe ankaŭ PY3ACE (Otto Vaske el RS), revenis en la verdajn ondojn.

- **KOTIZO** : Por individuaj membroj de UEA, ĝi estas nuntempe 116,- ned. gld ( ĉ. 3.500,00 Cr$). Per tiu sumo vi rajtos spekti almenaŭ du teatrajn vesperojn, kelkajn artajn aranĝojn, recitalojn kaj ĉeesti balon, prelegojn kaj kunvenojn dum sep plenaj tagoj. Se vi estas junulo vi pagos malpli kaj rajtos tranokti senpage. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, rapidu, ĉar, ek de aprilo, la kotizo atingos pli altan ŝtupon.

- **ARTAJ ARANĜOJ** : LKK jam starigis kontaktojn kun 15 ensembloj kaj aktoraj trupoj en Brazilo kaj eksterlande. La programo, antaŭvideble estos riĉa. Oni petas la artistojn interesitajn , kiuj ankoraŭ tion ne faris, sendi urĝe siajn proponojn al la adreso de LKK.

- **KARAVANOJ** jam estas anoncitaj de UEA, Francujo, Germanujo, Svislando, Usono, Aŭstrujo, Hispanujo kaj Japanujo. La gvidantino de la japanoj, S-ino Yukiko Isobe, alvenos en Brasília la 3an de marto por difini ĉiujn detalojn koncerne sian grupon.

- **POŜTMARKO** : La grafikaj proponoj ricevitaj laŭ la alvoko farita en "Tagiĝo", jam estis transdonitaj al ECT por elekto kaj ellaboro. Laŭ la lastaj informoj, la valoro de la poŝtmarko taŭgos por afranki enlandan leteron.

- **BRASÍLIA SUPER-RADIO** (FM/92,1) estas la unua radio-stacio de la ĉefurbo, kiu jam disponigis sian mikrofonon al ni. Ĉiusabate matene, en sia noti=caro inter la 8a kaj 9a horoj, la stacio dissendas informojn kaj intervjuojn pri Esperanto kaj la kongreso.

- **DUA BULTENO** , kun ĉiuj informoj pri hoteloj, ekskursoj, infan-kongreseto, ktp, estis presita en Brasília kaj dissendita, je la fino de fe=bruaro al ĉiuj aliĝintoj. Por mendoj de hoteloj kaj ekskursoj, oni petas la interesitojn uzi <u>EKSKLUZIVE</u> la mendilojn entenitajn en la Bulteno.

senac

La planitaj intensivaj kursoj por la komercaj kategorioj de Brasília, komenciĝos la <u>4an de majo</u> kaj daŭros ĝis la kongreso, laŭ diversaj vicoj, depende de la partopren-nombro. La estraro de SENAC vaste diskonigos la iniciaton kaj eldonos la instru-mate=rialon.


---

Ĉu <u>REVUO "VISÃO"</u> de la 22a de Sept. '80, esprimis, per tiu-ĉi karikaturo , la opi= =nion, ke nia movado konsistas el kadukuloj!? BEJO Reagu.

**Esperanto**

Desde agosto, os esperantistas brasileiros estão vivendo em ritmo de congresso. É que o 66º Congresso Universal de Esperanto será realizado em 1981 na capital federal.

WILSON BRIGIDO FREIRE DA SILVA
Fortaleza, CE



**KLAĈ-ANGULO**

<u>"Brazilo kantas prepare al la 66a</u>

Sub tiu titolo, revuo "Esper=anto de Januaro prezentis la tea=mon, kiu, direktita de Sylla Chaves produktis novan diskon en Esper. Jam pasintjare, okaze de karnava=lo, BEL eldonis diskon, kiu estis favore recenzita de la internacia gazetaro. Tiu gratulinda fak-aga=do vekis intereson en la rondoj de kantemuloj kaj LKK jam ricevis jenan telegramon: " RIO KANTAS PREPARE AL LA 66-a. KION FARAS BRASÍLIA ?". La respondo, polemike lakona, tekstis: "BRASÍLIA LABORAS!

=== 0 ===